





Boletín[★]

de la Federación Española de Esperanto



La chiquita piconera
Julio Romero de Torres



"BOLETIN" BULTENO DE HISPANA ESPERANTO - FEDERACIO

Centra Officejo: c/Rodriguez de San Pedro, 13.-3º.-P-7. 28015 MADRID.-

Prezidanto:

Antonio Alonso Núñez

Apartado 714

E-15780-SANTIAGO DE COMPOSTELA.

Sekretario:

Manuel López Hernández

Apartado 369

E-41080-SEVILLA (Hispanio)

Vicprezidanto:

Alberto Franco Ramirez

Vicsekretario:

Luis Gil Pérez

Estrarano pri Kontado.

Kasisto:

José M^a Bernabeu Franco

Gral. Primo Rivera, 6

03360-Callosa de Segura

(Alicante) Hispanio.

Pagojn sendu al tiu nomo en

Banco Español de Crédito

Konto n^o 138. 150507.9.

03360-Callosa de Segura.

Libro-Servo de HEF:

Luis Hernández García

Apartado 119

47080-VALLADOLID. (Hispanio)

"Fundacio Esperanto de HEF"

Sekretariino: Inés Gastón

P^a de la Constitución, 35.4^a

50001-ZARAGOZA (Hispanio)

Junulara Sekcio (HEJS)

Prezidanto: Iñaki GAUNA

Domingo Beltran, 42.-4^a.D.

01012-GASTEIZ-VITORIA

Cef-Redaktoro:

Antonio Marco Botella

Av. Compromiso de Caspe, 27/29.-9^a.-C.

E-50002 ZARAGOZA (Hispanio)

Redaktoroj kaj kunlaborantoj:

Salvador Gumá Clavell

Miguel Fernández Martín

Vicente Hernández Llusera

Andrés Martín González

Luis Serrano Pérez

Miguel Gutierrez Aduriz

Enhavo:

Don Juan Régulo Pérez..... 3/4 Paĝ.

Magia dato por Hispanio... 5/6/7 "

Belaĵoj el Hispanio..... 8 "

Korespondi deziras 9 "

Nekonsekvenco esperantigo 10/12 "

Lingva angulo 13 "

Alvoko: 1^a Lirika Festo.... 14 "

Viglas nia Movado 15/16 "

Mutamid, el Seviljo 17/18 "

Floraj Ludoj 19 "

G. Mora i Arana: poeto 20/21/22 "

Pri Julio Romero de Torres 23 "

Aliĝilo 51^a HEF-Kongreso 24/25 "

Kovrilo: Pentraĵo de Julio Romero de Torres. Legu paĝon 23an.-

NOTO.- Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Don Juan Régulo Pérez



Definitive, la venonta hispana Esperanto-kongreso okazos en La Laguna (Tenerife).

Ne, ne estis improvizita la elekto de tiu kongresurbo por la 51^a HEF-kongreso. Kaj ne estis hazarda aŭ ne pripensita la elekto, ĉar tie, en la ĉarma insulo Tenerifo loĝas, krom kolektivo de bonaj esperantistoj, ankaŭ unu el la figuroj plej prestiĝaj de la Universala Esperanta Movado: Prof. Juan

Régulo Pérez...

Ni, hispanaj esperantistoj, ŝuldas al li grandan dankon, ne nur pro lia eksterordinareco kiel intelektulo doninta sin al la servo de Esperanto, sed ankaŭ pro lia giganta tasko kiel esperantisto, pro tiuj 18 jaroj kiel ŝtate salajrata profesoro de Esperanto en samtitola katedro, por li kreita pri Lingvo kaj Literaturo en la Instituto pri Lingvoj de la Universitato de La Laguna, pro lia aktivado kiel eldonisto de libroj sub marko "Stafeto" disvastiganta kulturon kaj beletron tra la tuta mondo, pro liaj brilaj prelegoj, kaj resume, pro tiom da utilaj agadoj poresperantaj kiujn li malvolvis laŭlonge de tuta vivo. Ne vane li estas unu el la personoj plej elstaraj en la historio de la Esperanta Movado.

Prof. Régulo Pérez estas D-ro pri Filozofio kaj Beletrado. Ĝis sia emeritiĝo, profesoro pri Historio de la Hispana Lingvo en la Universitato de La Laguna. Aŭtoro de dekduo da libroj pri lingvoscienco kaj historio, unu el kiuj "Nobiliario de Canarias", kvarvoluma kun pli ol 4.300 paĝoj. Aŭtoro de multenombraj fakaj artikoloj en revuoj naciaj kaj internaciaj. Akademiano-korespondanto de la Reĝa Akademio de la Historio. Membro de la Akademio de Esperanto, de la Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino, de la Internacia Scienca Akademio Comenius, Rektoro de la Internacia Kongresa Universitato okaze de la Jubilea Kongreso de Esperanto en Varsovio, Honora Membro de UEA, Membro de ĝia Internacia Ekzamena Komisiono, ktp. Pri la signifo de lia peresperanta agado eminente verkis famaj esperantistoj omaĝe al li en la 2a volumo de "Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo" (festolibro eldonita de la Universitato de

La Laguna) dediĉita al Esperantismo. Fakte, multajn, multajn paĝojn oni povas verki pri lia esperantisma aktiveco ekde tiuj malproksimaj tagoj kiam ankoraŭ ne dudek-jara li jam gvidis kursojn de Esperanto en Tazacorte...

Dum monatoj kaj monatoj, HEF, zorgeme penis malkovri la momenton plej oportunan por organizi indan omaĝon al li. Finfine, ni trovis ĝin en nia lasta diskreta demarŝo kun niaj kanariaj samideanoj. Ni do nin sentas kontentaj anoncanta hodiaŭ al vi la novaĵon: la kongreso omaĝe al D-ro Régulo okazos en 1991a!

Kiel ni intencas omaĝi nian ŝatatan profesoron? Evidente, ankoraŭ ne venis la momento anonci definitivajn programon, eĉ ankaŭ ne programeron. Sed ni povas jam anticipi ke ni havas la firman volon organizi memorindan kongreson, kaj en ĝi kiel stelon brilan de la programo: "Internacian Poezian Feston honore al Prof. Régulo".

Ni jam invitas ĉiujn esperantistajn poetojn kaj verkistojn el la kvin mondopartoj partopreni tiun Internacian Feston. Ni dezirus, ke grandparte el ili ne nur persone partoprenu la Feston, sed ankaŭ deklamu la proprajn originalajn poemojn. Preskaŭ certe, la organizanto de tiu programero estos nia kolego Miguel Fernández Martín, kies interveno jam garantias kontentigan nivelon kaj altan kvaliton poezian de la Festo...

Laŭ mia opinio, neniu pli rava loko povas ekzisti por tiu omaĝo ol la belega Kanaria Insularo. Neniu pli pura kaj reva etoso ol Poezia Festo. Neniu esperantisto kun pli da meritoj por ricevi ĉies dankon ol profesoro Régulo Pérez. Lumo, Poezio kaj Amo kunfanditaj por omaĝi nian ŝatatan profesoron!

Samideanoj kaj amikoj: en la unikaj kaj sorĉaj Kanariaj Insuloj ni nepre kolektiĝu por travivi memorindajn horojn...!!!

Antonio Marco Botella.

*** ***** *** ***** ***
"EL POPOLA ĈINIO" anoncas abonvarban periodon kun novaj abonprezoj. Landa Peranto: Félix Gómez Martín; str. Corbeta, 8.-5ª. A. 28042-MADRID. Ne sendu la monon per ĉeko, prefere per poŝtgiro aŭ rekte al "Caja Madrid" konto n° 2038, 1828-600. Zona Ind. Aerp. Barajas. 28042-MADRID. Novaj prezoj: 1 jaro: 1550, Ptoj 2 jaroj: 2500 Ptoj.- 3 jaroj: 3500 Ptoj.

Magia dato por Hispanio: la jaro 1.992

UNIVERSALA EKSPOZICIO EN SEVILJO.-

KVINCENTA JARA DATREVENO DE LA MALKOVRO DE AMERIKO.-

OLIMPIADO EN BARCELONO.-

KOMPLETA INTEGRIGO DE HISPANIO EN L'EUROPA KOMUNUMO.-

MADRIDO, KULTURA ĈEFURBO EL EUROPO.-

La supre menciitaj eventoj estas gravaj okazantaĵoj, kiuj sendube vekos la atenton en la tuta mondo. Eble, en tiu jaro, Hispanujo fariĝos la centro de la mondo. Nuntempe niaj spertuloj, tiuj saĝaj sinjoroj, kiuj antaŭvidas la estontecon de nia lando, metas kiel daton tiun jarón 1992an. Jam oni komencis diri, antaŭ kaj post 1992. Ĝi estas grava referenco sur kiu baziĝas multaj esperoj kaj deziroj de la hispanoj. Ĉu ni kapablos kontentige sukcesi en tiaj gravaj entreprenoj?. Se ni aŭskultas la antaŭdirojn de la respondecaj personoj, kiuj okupiĝas pri tiom gravaj kaj laboraj taskoj verŝajne la sukceso estos certa fakto. Sed ni bone scias, ke ne estas same projekti kiel realigi...

Evidentas, ke oni ne povas miksi la kvin supre menciitajn temojn, ĉar ĉiu havas sian propran identecon, kvankam ĉiuj kune motives la grandan hispanan defion antaŭ la mondo. Hodiaŭ ni okupiĝu pri la unua:



Malgraŭ tio, ke la Universala Ekspozicio estas ligita al la festo por memori la malkovron de Ameriko, mi preferas komentariojn ĝin aparte, ĉar fakte, la Universala Ekspozicio estas temo pli ampleksa ol tiu pri Ameriko, ĉar dum tiu ĉi estas tute fakeca kaj konkreta, la alia pretendos speguli la estontecon de la mondo pere de la diversaj branĉoj kaj facetoj, kiuj konsistigos la futuron.

Mi, ordinara civitano, multe miras pro la hispana kuraĝo organizi tiom eksterordinaran ekspozicion. Ĝi akiras aldonan rangon pro la fakto, ke la granda, industria kaj ĉiopova Ĉikago rezignis ĝin organizi. Do, laŭdojn al nia kuraĝo. En la Ekspozicio prezentos siajn teknikaĵojn pli ol 100 landoj. Ankoraŭ mankas multaj monatoj, tamen, se ni atentis al la rapida evoluo de la tekniko, la scienco kaj eĉ la vivo mem de la homo, verŝajne neniuj kapablas antaŭvidi la aspekton plej okulfrapan de tiu Ekspozicio, tiel vertiĝe evoluas antaŭ niaj okuloj la tekniko kaj nia vivo.

Grandega kaj ampleksa fenestro estos Seviljo, pri tio ekzistas


nenia dubo. Ĉu ni kapablos eltiri utilajn profitojn de tiu montrofenestro? Kiamaniere la hispanoj uzos ĝin kaj kun kiu celo oni prezentas tiun Ekspozicion?, ĉar mi ne dubas, ke ĝi havos specifan celon, ĉu?. Vero ja estas, ke pri tio mi nenion legis. Ĉiam oni laŭdas la Ekspozicion, sed unu el la oportunaj demandoj estas: post la Ekspozicio, kio?

La elspezoj por la konstruado de tiuj gigantaj projektoj estas ja senlimaj, kiel senmezuraj estas la ekonomia helpo kiu devas alporti la hispana popolo. Ne povas ekzisti eĉ la plej eta suspekto pri eventuala fiasko: de la 20a de aprilo ĝis la 12a de oktobro Hispanujo estos la spegulo en kiu sin rigardos la progreso de la tuta mondo, ĉar ĉi tie venos la plej grandaj inventoj. La monopoloj, kiuj hodiaŭ regas la mondon, montros siajn fortojn en tiu Ekspozicio. La batalo industria, teknika kaj scienca estos tre, tre serioza... Kaj Hispanujo, kion ekspozicios? Ĉu ni estas sufiĉe fortaj por konkuri kun eksterlandaj ekonomiaj potencoj? ,aŭ, ĉu nia sola kontribuo estos la hispana suno? Mi jam scias, ke mi starigas multajn demandojn, sed tiuj demandoj kaj multaj aliaj ankoraŭ farindaj, fakte, estas en la menso de ĉiu hispano, jen kial, eble estus oportuna ankoraŭ nin demandi: ĉu ordinara hispano sentas specialan intereson pri tiu Ekspozicio?.

Mi ne scias ĉu en tiu bela revo de la homaro pri progreso ankoraŭ troviĝas la militaj maŝinoj. Mi nenion scias se en nia Ekspozicio okupos lokon industrio kies unika celo estas mortigo. En mia opinio, la Ekspozicio de Seviljo devas montri ĉion signifantan plifortigon pri kunvivado, progreso kaj justeco inter la homoj. Nenia ekspoziciaĵo, eĉ la plej valora, estos utila por la homaro, se poste en la mondo daŭras la diskriminacioj, maljustecoj kaj privilegioj. Se la Ekspozicio de Seviljo nur favoros tiujn, kiuj jam ĉion posedas, tiujn kiuj ekde siaj brakseĝoj regas la mondon, la fiasko de la Ekspozicio sub homama vidpunkto estas certa. La Ekspozicio devas esti, antaŭ ĉio, mesaĝo pri paco kaj kunvivado, pragmata ekspono de ĉiuj elementoj, kiuj metitaj je la servo de la homaro donu al ĝi la komforton de la plej grandaj atingoj de la moderna tekniko. Ne sufiĉas scii pri la ekzisto de perfektaj maŝinoj, se nur je kelkaj metroj, aŭ eble kilometroj, de la Ekspozicio multenombraj homoj mortas pro soifo kaj malsato...

La hispana popolo devas postuli, ke tiu Ekspozicio estu, ne la eksponejo de raraj mirindaj elementoj uzeblaj kaj je la sola atingo de privilegia elito, sed precipe de ilaro kiu taŭgos kiel eble plej efike kaj malmultkoste por mildigi la vivkondiĉojn de milionoj da homoj vivantaj nun en absoluta mizero. Tia realaĵo donus karakteron kaj signifon al la adjektivo Universala Ekspozicio.

Evidentas, ke Seviljo, la bela andaluzia urbo, estas alloga kaj adekvata por tiu internacia evento. La simpatio de ĝiaj loĝantoj, l'artverkoj, la favora klimato kaj tipa folkloro tutmonde konataj, ĉio tio sendube



instigos multajn eksterlandanojn veni al Hispanujo, en tiu ĉi kazo al Seviljo. La novaj konstruaĵoj, la novaj vojoj, la tuta nova substrukturo de la urbo starigotaj por la evento, restos kiel posedaĵo de Seviljo kaj taŭgos kiel utilaj elementoj por estontaj eventualaj ekspansioj de la urbo.

Donas ideon pri la malfacilo de tiu ĉi entrepreno la fakton, ke dum la lastaj kvindek jaroj nur okazis tri Universalaj Ekspozicioj, nome: Bruselo en la jaro 1958, Montrealo en 1967, kaj en Osaka en 1970. Impona amaso da personoj vizitos Seviljon: certe ne malpli ol 20 milionojn, kaj, verŝajne pli ol du mil milionoj vidos ĝin pere de televido.


Por ni, esperantistoj, krom la normalaj allogoj kiujn Ekspozicio havas por ĉiu homo, ĝi havas aldonan intereson: la lingva problemo. Kio okazos?, ĉu daŭre funkcios la Babela Turo?, ĉu ne estos bona

okazo por evidentigi la dimension pri tiel grava problemo? Kiamaniere interkompreniĝos tiom da personoj kun tiom da malsamaj lingvoj? Kiel interkompreniĝos la vizitantoj kun la deĵorantoj de standoj?. Ĉu robotoj anstataŭos la homojn?. Ĉu UEA aŭ alia asocio de la Esperanta Movado starigos standon en tiu fenestro de la kulturo? Ĉar tiu Ekspozicio ankaŭ estos kultura, aŭ nel. Mi opinias, ke estas oportuna momento por ke HEF studu kun UEA tiun temon, ĉu ne? Ĉiukaze, mi esperas, ke la aktivaj seviljaj esperantistoj ne restos pasivaj! Gravas, ke ni, esperantistoj, jam pretigu nian planon antaŭ tiu evento.

Miaopinie, la Universala Ekspozicio interesas al Seviljo, al Hispanio, al la tuta mondo, kaj fariĝos memorinda okazaĵo se la organizantoj prezentas ĝin, ne kiel okulfrapa ekspono de inventoj, lastaj malkovroj de la tekniko kaj la scienco, sed precipe praktike montrante kiel ĉio kion oni ekspozicias povas esti utila kaj facile uzata de la homo por la plibonigo de la vivkondiĉoj de la homaro. Fakte, ne tro gravas se tiu sapo lavas pli blanke ol la alia, aŭ se tiu aŭtomobilo rapidas pli ol la ceteraj, aŭ se tiu kompleksa aparato vizitis/vizitos niajn planedojn... gravas ekspozicii instrumentojn kaj sistemojn por haltigi la dezertigon de la tero, aŭ purigi la maron kaj riverojn, aŭ por trovi akvon kaj sati la soifon de milionoj da homoj, aŭ, kiel multoblige la rikoltojn kaj sati la malsaton de tiom da milionoj da infanoj... Se tiuj aŭ similaj celoj realiĝas, certe la Universala Ekspozicio de Seviljo plene sukcesos!

Luis Serrano Pérez

Belaĵoj el Hispanio



BORSO DE LA KOMERCISTOJ: LONĤA DE VALENCIO.

Oni komencis konstrui ĉi tiun "Lonĥa" la 7an de Novembro de 1482^a, gvidate de la arkitekto Pere Compte. En tiu epoko Katalunio ekmalaperis kiel komerca potenco de la mediteranea marbordo, dum Valencio multe ekriĉiĝis. La urbo Valencio estis la plej loĝata tiam en la tuta Hispanio. La mara komerco grandiĝis. Laŭ la Kulturo, ĝi estis fokuso por por la tuta Eŭropo, kaj baldaŭ venis la Ora Jarcento de la Valencia Literatura, kiu multe influis en nia lando, ĉefe en Katalunio. Pro tio, oni bezonis lokalon por la komercaj interŝanĝoj, sufiĉe decan kaj imponan, kiu estis "La Lonĥa". Ĝi estas unu el la plej mirindaj civilaj konstruaĵoj, en gotika stilo, de la tuta Eŭropo. La ĉefa salono, multkolora, ortangula, ampleksas 35,60 m. x 21,39 m., kaj altas 17,39 m. Ĝi dividiĝas je tri navoj laŭlonge kaj kvin perpendikle, kun kvin kolonoj kiuj subtenas la volbojn. La bildo kiun oni perceptas estas, ke la kolonoj estas arboj de la Paradizo.

kaj la volboj je aspekto de la ĉiela volbo.

La mezuroj de la konstruaĵo, pordoj, kolonoj, arkoj, k.c. respondas al inicialaj kodoj devenantaj de la Biblio, kiuj sanktigas la spacon de la "Lonĉa", kiu estas komerca sanktejo bazita je "bona fides", kiu krom alporto de riĉeco helpas atingi la eternan vivon.

Citindaj estas la plafonoj, kun kasonaro devenanta de la antikva Urbodomo (15a jc.) kaj la "Purísima" (Dipatrino skulptaĵo) de Espinosa. En la "Lonĉa" troviĝas gravaj renesancaj artverkoj, kiel la mirinda plinto, ornamita de 40 bustoj ene de artaj medalionoj. Oni supozas, ke ĉiuj reprezentas famulojn de la epoko, el kiuj multaj ĝis nun ne estas identigitaj.

Nuntempe la "Lonĉa" estas sidejo de ekspozicioj kaj artaj aranĝoj. Dimanĉe okazas tie filatela merkato, kaj dum "Fallas" (lokaj plej gravaj festoj) oni povas rigardi en la ĉefa salono la ekspozicion de "ninots" (kartonaj pupoj) kaj voĉdoni por la plej bona por savi ĝin de la fajro.

Aŭgusto.

Korespondi deziras

16-jara knabino dez. kor. kun hispanaj E-gelernantoj pri div. temoj. Adreso: Katalin Balassa. M-9171 Györuifalu. Martirok, ut. 63. Hungario.

Homo loĝanta en frenezulejo bezonanta helpon, kun gravaj problemoj pri kredebleco, dez. kor. kun personoj sentivaj pri tiuj kazoj. Bonv. skribi: Jan Profugus Vluchtman. J.F. Kennedylaan 301.-6419XZ-HEERLEN. Nederlando.

40-jara bulgara esperantistino posedanta privatan firmon pri internacia turismo dez. kor. kun samprofesiaj fakuloj. Ankaŭ kor. pri muziko, beletro, lingvoj, ktp. Adreso: Russe "Lozen" bl. rh.A. Svetla Schishnova kompl. Rodina. Bulgario.

33-jara geologo dez. interŝanĝi kasedo-diskojn, precipe pri-folkloraj; ankaŭ librojn eldonitajn en Brazilo. Adreso: Pekim Vaz. Caixa postal 3250.-69001-MANAUS. AM. Brazilo.

23-jara alĝeriano dez. kor. pri div. temoj, speciale pri muziko kaj turismo. Bonv. skribi: Mohammed Lalam; Rue 01 n^o 33. Matervre. Maghnia (W) TLEMCEM. C.P.13300. Alĝerio.

Nekonsekvenca esperantigo de hispanlingvaj nomoj

Senmetoda, senprincipa kompilaĵo.

En 1989 Esperanto-Centro Paderborno en F.R.Germanio eldonis libron titolitan "Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj". La esperantigo kaj kompilado de tiu amaso da leksika materialo estis farita de du membroj de la t.n. "Analiza Skolo", la korifeo Richard Schulz kaj lia helpanto Hermann Behrmann. Ili mem uzas la asimilitajn nomformojn Rikardo Ŝulco kaj Hermano Bermano. La 141-paĝa nomindekso celas provizi esperantistojn per esperantigitaj formoj de nomoj de personoj kaj geografiaj lokoj el plej diversaj kulturoj kaj lingvoj. La du kompilintoj transskribis aŭ transliteris la nomojn per la literoj de la Esperanta alfabeto, por ke ili estu facile legeblaj kaj prononceblaj. Ĉar la asimilitaj nomoj devas konformi al la Esperanta ortografio, sen aldono de fremdaj literoj aŭ specialaj



diakritaj signoj, estas ofte necese fari drastajn fonetikajn modifojn, kelkfoje ĝis nereconebleco. Plue, ĉiu nomo tiel traktita devas havi la substantivan gramatikan finaĵon "o". Entrudiĝis ankaŭ kelkaj fiksjaj ideoj de la Analiza Skolo, kiuj kondukis al nepravigebla kripligo de la formo de pluraj etnolingvaj nomoj. Unu el ili estas la postulo, ke femalaj nomoj nepre havu la sufikson "-in", ĉar la Skolanoj kategorie rifuzas la uzon de inaj nomoj finiĝantaj per la litero "a". Kun rilato al loknomoj, estas malpermesite uzi "-io", ĉar ili ne rigardas ĝin kiel sufikson; sekve la sufikso "-uj" devas esti uzata. Krome, etnolingvaj radikoj havantaj silabojn identajn kun Esperantaj afiksoj kiel "-in" kaj "-et"

estas ŝanĝitaj al "en" kaj "ed" respektive.

Ĉar Schulz kaj Behrmann ne formulis klarajn gvidliniojn aŭ principojn por asimilado de propraj nomoj el ĉiu aparta lingvo, la rezulto estas, ke ilia kompilaĵo enhavas plurajn nekonsekvencajn nomformojn en Esperanto. Tiaj kaprice esperantigitaj nomoj neniel estas racie pravigeblaj, kaj ili donas al la publikigaĵo diletantecan aspekton.

La kompilintoj ne kontentiĝis nur pri la ĉi-supraj fonetikaj kaj

morfologiaj ŝanĝoj; kelkfoje ili eĉ tradukis en Esperanton etnolingvajn morfemojn, konsistigantajn proprajn nomojn. Tiel, la asimilita nomo ne plu similas al sia originala etnolingva formo.

Ne estas eble, en mallonga artikolo destinita por publikigo en periodaĵo, kritiki kaj ĝustigi la tutan enhavon de "Leksara kolekto". Tie ĉi sufiĉos prezenti tipajn ekzemplojn, kiuj reliefigos la mispaŝojn de Schulz kaj Behrmann. Mi ilustras mian pritrakton per hispanlingvaj propraj nomoj. Fonetikaj bizaraĵoj.

Estas evidente, ke la kompilintoj de la leksaro ne havas profundan scion pri la fonetiko de la kastilia lingvo, nek en Eŭropo nek en Ameriko. La kastilia lingvo parolata en la plej granda parto de Hispanio havas fonemon, kies fonetika simbolo estas la helena litero teta /θ/. Ĉar ĝi ne havas ekvivalenton en la Esperanta alfabeto, asimilado ne povas esti fonetisma sed nur grafisma. Sekve, la kastilia z estu transkribita per la Esperanta "z" senkonsidere de la prononco de la originala nomo. Uzante tiun ĉi simplan regulon eĉ lerneĵ-bubo povas esperantigi Zaragoza, skribante Zaragozo. Sed kion faris Schulz kaj Behrmann? Ili transskribis la unuan z per "z" sed la dua per s: Zaragosol!!! Ili stumblas sammaniere ĉe Guipúzcoa kaj Velazquez, kiuj fariĝas Gipusko kaj Velasko respektive. Ekzemplo de ankoraŭ unu anomalio estas la traktado de la fina silabo Murcia kaj Valencia, ĉar du malsamaj transkriboj aperas en la asimilitaj formoj: Mursjo kaj Valencjo!

Ankaŭ hispanamerikaj propraj nomoj manifestas la saman specon de kaprica esperantigo. En tiu vasta mondparto hispanlingvuloj anstataŭigis la fonemon /θ/ per /s/, sed la ortografio ne diferencas de tiu en la kastilia normlingvo. Pro tio transkribado devas okazi per la Esperanta litero "z", ne "s". Estus sencece skribi Zaragozo por la urbo en Hispanio kaj Saragoso por la samnoma urbo en Kolombio.

Bedaŭrinde, Schulz kaj Behrmann ne observas tiun principon, kaj pekas pri lingvistikaj ekstravagancoj. Al Matanzas, urbo en Kubo, ili donas la Esperantan formon Matanco, kaj tiu nepravigebla "c" troviĝas ankaŭ en la bizara formo "Acteko", kies meksik-hispana formo azteca estas facile asimilebla kiel azteko. Eĉ pli okulagacan ekzemplon de nekonsekvenca esperantigo donas jenaj du indiĝenaj nomoj el nahŭatla deveno: ŝoĉitlino kaj ksolotlo. En Meksiko kaj aliaj hispanamerikaj landoj, la grafio x en indianoj kaj vortoj estas prononcata kiel "ŝ" en Esperanto. Sekve, la asimilitaj formoj de la du nomoj de aztekaĵoj devas esti ŝoĉitla kaj ŝolotlo. Nesolvebla enigmo estas la transkriboj faritaj de Schulz kaj Behrmann: "ŝ" en unu nomo kaj "ks" en la alia! Ĝuste tiuspecaj malsimetrioj makulas la tutan kompilaĵon.

Virinaj nomoj kun la sufikso "-in"

La Analiza Skolo anatemis nomformojn kiel Amalia kaj Elvira en Esperanto, ĉar ili havas la adjektivan finaĵon "a". Por ke ili estu substantivoj signifantaj femalojn, estas necese aldoni la sufikson "-in" kaj la finaĵon "o": Amalino, Elvirino. Inaj nomoj finiĝantaj per konsonanto ricevas la saman traktadon: Carmen, Inés kaj Isabel fariĝas Karmino, Agnino kaj Isablino respektive. Ankaŭ Pepita estas rebaptita per Pepino! Schulz kaj Behrmann aplikas la saman procedon al loknomoj formitaj surbaze de virina nomo, sed ili agas tute nekonsekvence. Santa Isabel estas esperantigita per Sanizablino, kaj ankaŭ la franca urbo Saintes-Maries-de-la Mer ricevas inan formon: Sanmarinoj Delmaro. Male, sensufiksaj estas Santa Bárbara, Santa Clara kaj Santa Lucia: Sanbarbaro, Sanklaro, Sanlucol

Aliaj morfologiaj transformoj.-

La Esperantaj sufiksoj "-in" kaj "-et" ne povas resti en asimilita propra nomo, do Medellin ricevas la formon Medeljeno kaj Albacete fariĝas Albacedo. Estas nekompreneble, kial Santiago aperas kun du asimilitaj formoj: Sanjago kaj Sanjagujo (Santiago de Cuba). Oni emas demandi, ĉu Santiago de Chile devas esti esperantigita alimaniere por diferencigi ĝin.

Tradukado de etnolingvaj morfemoj.-

Plurloke en la kompilaĵo troviĝas asimilaĵoj formitaj per tradukado de parto aŭ la tuto de la originala etnolingva nomo. Ankoraŭfoje la rimedo ne estas aplikata en ĉiuj eblaj kazoj. La meksika havenurbo Veracruz aperas en Esperanta formo kiel Verakruco; sekve, oni atendas, ke Santa Cruz estu Santakruco, sed ĝia esperantigita formo estas Sankruzo. Same, La Paz estas asimilita ne kiel Lapaco sed kiel Lapazo. Tria ekz. estas Santa Fé, kiu ne estas Sanktafido sed Sanfeo.


Kompleteco de la kompilaĵo.-

Ĉar en la titolo de la verko estas la vortoj "ofte uzataj propraj nomoj", mi provis taksu la kompletecon de la kompilaĵo laŭ la vidpunkto de la historio kaj kulturo de landoj loĝataj de hispanlingvuloj. Post kontrolo de kelkaj temoj, mi tiris la konkludon, ke "ofte uzataj" estas sensencaĵo. Ekz., el kvindek da provincoj en Hispanio, unu triono mankas; ĉu Burgos, Cáceres, Ciudad Real, Cuenca, Huelva, ktp. eble estas maloftaj uzataj propraj nomoj kompare kun la aliaj provinc-nomoj? La rikolto de propraj nomoj el la plej vaste legata literatura verko de la hispana kulturo ja estas magra. Schulz kaj Behrmann registras Cervanto sed ne Saavedra, Sjur (tiele!) Kiŝoto sed nur Panzo (Sancho mankas), Dulcino sed ne Rocinante, Manĉo sed ne El Toboso, Estremaduro sed ne Guadiana, ktp. Inter elstaraj pentristoj de Hispanio mi rimarkis Velasko kaj Pikaso sed vane mi serĉis esperantigitajn formojn de jenaj nomoj: Murillo, El Greco, Goya, Zurbarán kaj Sorolla. Estas eble daŭrigi per ekzemploj el aliaj fakoj por demonstri, kiel Schulz

kaj Behrmann mistakte marŝis sur la tereno de Hispanlingvujo.

Ĉar ili faris similajn fuŝaĵojn kun rilato al aliaj lingvoj kaj kulturoj, estas necese konkludi, ke "Leksara kolekto" ne havas grandan valoron kiel konsultlibro.

Bernard Golden.




Lingva angulo

Unu el la plej utilaj servoj de niaj kongresoj estas la kolektiĝo de multaj malsamlokaĵ samideanoj por vivi Esperanton per praktika uzado dum unu ne plena semajno en la jaro, kio estas tro malgrava okazo.

Atenta observanto rimarkas dum tiuj tagoj lingvajn diferencojn kaj "peke-tojn" ofte transdonatajn de la instruantoj mem al siaj instruatoj. Por ekzemplo, kiel vi diras la nomon de nia Majstro? ĉu Zámenhof, ĉu Zaménhof, ĉu Zamenhóf?. Ĉar Esperanto havas la akcenton sur la antaŭlasta silabo, la ĝusta diro estas Zaménhof kaj ne Zámenhof aŭ Zamenhóf kiel oni diras eĉ sur la stradoj de niaj Universalaj Kongresoj. Zamenhof estis pola kaj la pola lingvo estas ankaŭ paroksitona (ĝi havas la akcenton sur la antaŭlasta silabo).

La korelativajn vortojn tiu-kiu, tiuj-kiuj, tiujn-kiujn oni akcentas ankaŭ sur la antaŭlasta: tí-u kí-u, tí-uj kí-uj, tí-ujn kí-ujn kaj tute ne tiŭ-kiŭ, nek tiŭi-kiŭi, nek tiŭin-kiŭin kun la vokala i anstataŭ la konsonanta j. Ekzemplo: Mi jam legis tí-ujn librojn kí-ujn vi donis al mi (ne ti-ŭin librojn, ki-ŭin vi donis al mi).

Salvador Gumá Clavell



1ª LIRIKA FESTO DE HEF.-

Hispana Esperanto-Federacio invitas la e-istaron en la internacia omaĝo al Prof. Juan Régulo Pérez kaj ĉiujn kompetentajn E-poetojn kontribui per plej altkvalitaj verkoj al pleja brilo de la tiucele konceptita 1ª LIRIKA FESTO DE HEF, kadre de la 51a HEF-kongreso, okazonta en La Laguna (Tenerife. Kanariaj Insuloj) de la 14a ĝis la 19a de Julio 1991.

La 1ª LIRIKA FESTO DE HEF disvolviĝos laŭ la jenaj gvidpunktoj:

1ª) La kernon de la festo-omaĝo konsistigos libertemaj originalaj aŭ esperantigitaj poemoj kaj poeziaj prozaĵoj, kun aŭ sen komentoj, kaj eseoj, studaĵoj, monografiaj temoj k.s. pri E-aj aŭ naciaj poetiko, poetoj kaj poemoj, ĉiuokaze kun internaciaj kaj plej altaj valoro kaj intereso.

2ª) Plie, surbaze de muzikigitaj poemoj, oni muntos lirikan-muzikan spektaklon.

3ª) Ĉian kontribuajon oni sendu al nia adreso ĝis la 30a de Aprilo 1991, sendepende de tio, ĉu la aŭtoro intencas ĝin interpreti mem aŭ lasi tian taskon al la membroj de nia koncerna skipo. (Oni precizigu ĉi cirkonstancon).

4ª) Rilate al muzikigitaj poemoj, oni kromsendu kasede registritaj la kantojn kun la voĉo(j) de la interpretonto(j) aŭ la partituron, se oni komisiis la interpretadon al la membroj de nia koncerna skipo.

5ª) La definitiva akceptado de kontribuajoj efektiviĝos nur per aplikado de la plej rigoraj kriterioj de la E-a stilistiko.

6ª) Pri neakceptitaj verkoj ni donos nenian respondon.

7ª) Nia organiza teamo rigardas ĉi aranĝon en la perspektivo de sinergia strategio. Sekve, la verkoj elektitaj konstituos, krome, kaj estimindan materialon por la studkajeroj de la de HEF projektitaj preuniversitataj kursoj en E-o kaj la fundamenton de eventuale eldonotaj libro kaj kasedo de la 1ª LIRIKA FESTO DE HEF.

8ª) Tial, ke nia financa situacio neniel, bedaŭrinde, permesas al ni okupiĝi pri vetur-kaj restad-kostoj de la festontaj

poetoj, tiuj devos kovri tiajn elspezojn proprapoŝe.


9a) Ĉeesto de la aŭtoroj, kvankam dezirata de ni, ne nepras. La aŭtoroj, tamen, precizigu ĉi cirkonstancon.

10a) Verkojn sendu al: Miguel Fernández Martín. Santa Genoveva, 58.- 6a.C. E-28017 MADRID.

Viglas nia movado

GIJON.- De la 12a ĝis la 14a de Oktobro 1990 okazis la 3a Astura Esperanto-Kongreso modele organizita de "Astura Esperanto Asocio" de la indikita urbo, vere sukcesa, ne nur ĉar partoprenis ĝin kontentiga nombro de esperantistoj el diversaj hispanaj regionoj, sed precipe ĉar prestiĝaj prelegantoj unuarangaj donis al ĝi tiun specialan nuancon de la memorindaj eventoj. S-ro Antonio Alonso Núñez, prezidanto de HEF, prelegis pri la temo "Ĉu nova homa rajto: la rajto je komuniko". Tre interesa la tezo de S-ro Alonso, kiu analizis la lingvan problemon en la mondo sub diversaj aspektoj, substrekante per inteligenta rezonado la rajton de la individuoj al la komunikado farita per racia internacia lingvo facile lernebla de ĉiu homo. La interesa ekspono vekis riĉigan debaton inter la ĉeestantoj.

Prelegis ankaŭ, ĉi-foje en la hispana lingvo, la katedra prof-ino pri Juro en la Valladolida Universitato D-rino M^a Rafaela Urueña, pri temo simila al tiu de la antaŭe citita preleginto, sed laŭjure. "Esperanto kaj la nova Internacia Ordo pri Komunikado" estis la temo brile malvolvata de la elokventa prelegantino, kiu akcentis kiel la aktuala leĝaro alfrontis la defion de nia epoko pri la altnivela teknologia evoluo postulanta konvenan interkomunikadon inter landoj kaj kontinentoj sed preterlasante la teruran vakuon pri alprenado de internacia lingvo, instrumento pli ol necesa por ebligi novan internacian ordon pri komunikado, eraro kiu ebligis la nunan



lingvo-ŝaŝon en la internaciaj rilatoj.

Kaj kiel lasta preleginto de tiu eksterordinara triopo, S-ro Miguel Fernández Martín, tradukinto de pluraj verkoj de Garcia Lorca, ripetis sian ĉi-jaran prelegon en Sant Cugat: "Sur la spuroj de Federico Garcia Lorca". Aŭdi tian prelegon estas unu el la plej agrablaj spertoj okazanta al iu ajn esperantisto, ĉar deklamo de belaj poemoj, kanto de koploj kun andaluza sorĉo kaj dokta prijuĝo de viveroj pri Lorca, kunfandiĝas laŭlonge de la prelego lasante en ni la sensacon de arta emocia mesaĝo tute neforgesebla...

Aldone al la raporto de tiel belaj prelegoj oni devas ankaŭ menciigi la laborkunsidojn, celo plej grava de la kongreso, kiuj studis la problemaron de la asturiaj Esperanto-Grupoj kun la koncernaj eventualaj solvoj, kaj ankaŭ kiel kunordigi la agadon de la esperantistoj en tiu ampleksa regiono de la Kantabra strando.

Gazetaro, Radio kaj Televido sufiĉe kontentige okupiĝis pri tiu ĉi regiona kongreso. Gratulon do al "Astura E-Asocio" organizinto de la interesa kongreseto. Dankon al la monhelpintoj: Katedro "Jovellanos" pri Universitata Disvastigo, Asturia Ŝparkaso, Agrokampara Ŝparkaso kaj Regiona Departemento pri Turismo. Gratulon kaj dankon al la LKK kaj kunlaborintoj.

Laŭ raporto de Santiago Mulas.

Murcio.- La 13an kaj 14an de Aprilo 1991 okazos en Alcantari-lla (Murcio) la 2a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio. Tre interesa programo. Speciala invito al HEF-anoj. Bonvolu peti informojn: OKK 2a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio. C/ Santa Teresa, 10, bajo A. 30005-MURCIA.

Podébrady.- Verda Ŝakolimpiko.- La 3a Verda Ŝakolimpiko okazos de la 5a ĝis la 14a de Julio 1991 en la indikita urbo, oriente de la ĉekoslovaka ĉefurbo Praha. Krom la ŝakprogramoj, okazos ankaŭ du kulturvesperoj, aŭtobusaj ekskursoj al ĉeĥa Paradizo kaj plej gravaj urboj. Informoj: S-ro Vaclav Stěpánek, Macurova 16; CS PRAHA. Ĉekoslovakio.

La Chaux-de-Fonds.- Kultura Centro Esperantista komencas la novan jaron per Esperanto-Ekzamenoj laŭ la internaciaj normoj de UEA/ILEI, la 3an kaj 4an de Januaro 1991. Sekvos du Studaj Semainfinoj kaj du Esperanto-staĝoj. Inf.: K.C.E. Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds. Svisio.

Mutamid, el Seviljo



Muhammad ibn Abbad al Mutamid, reĝo de la tajfo-regno de Seviljo, elstara poeto. en sia regno malavara favoranto de beletro, arto kaj sciencoj, sed prefere mecenato de la Poezio kaj decida helpanto ne nur de la hispana-arabaj poetoj, sed ankaŭ de la orient-muzulmanaj, kiujn li pensiis kaj ebligis digne vivadi, tiamaniere, ke baldaŭ Seviljo fariĝis kultura ĉefurbo de la epoko kaj fokuso senkompara de la poezio kaj la sciado de la okcidenta mondo.

Li okupis la tronon (1069) post la forpaso de lia patro, ankaŭ elstara poeto kaj unu el tiuj legendaj homoj malfacile forgesebaj, ĉar li konstante revis kaj batalis por la unuiĝo de Al-Andalus, kaj liaj festoj apud Gvadalkiviro famiĝis ankaŭ kiel kulturaj eventoj.

Kiel poeto, Mutamid reprezentas la neoklasikan stilon de la poezio hispana-araba, sed donante al ĝi certajn modernismajn nuancojn, kiuj aperas ekde liaj unuaj versoj... Sinteze oni povas diri, ke li verkas modernan poezion per la klasikaj samaj elementoj el pasinto. Jen unu el tiuj poemoj montranta la indikitajn karakterizojn:

FESTA NOKTO.-

*Vere, mi ja trinkis vinon,
kiu verŝis likvan helon,
dum venis la nokta nigro
ŝov-ŝove inter misteroj
kaj la tenebraj vualoj
kun senformaj siluetoj.*

*Nigris, ĝis kiam la luno
emerĝis ĉe la Ĝemeloj,
kun sia pompo kaj lukso
kvazaŭ tutpotenca reĝo
reganta ekde la supro
per prudento kaj saĝeco.*

*Kvazaŭ konkure, la steloj,
ŝprucis sub formo de lumoj
por kompletigi la helon
ĉirkaŭ la brilanta luno...
Poste, kiam kun neglekto
iris ĝi, kiel per flugo
promene en Okcidenton,
aperis ĉe l' rendezuo
Orion': tapiŝ' el perloj
super la tron' de la luno.*

*La Plejadoj, kiel flago
flirtis ĉe masto imaga,*

dum la steloj, ĉe la flankoj
de la luntrono lumhava,
ĝin eskortis en parado
de impona fest' omaĝa...

Tiel mi estas surtere
inter aroj da virinoj,
kiuj al sia beleco
aldonas la altan brilon
de rango, amo kaj klero
logantaj mian spiriton.
Se l'armaĵ' de militisto
rompas per heloj tenebron,
same la glasoj da vino
nin plenigas el reflektaj
kiel l'okul' de virino
brilas en la nokta festo.

La vivo de Mutamid, ne tiel malfacila kaj heroa kiel tiu de lia patro, ankaŭ estis admirinda kaj interesa: kiel princo, tre juna ankoraŭ, li regis la regionon de la portugala Algarbo, ĝuante ĉiujn plezurojn kaj ĉirkaŭata de juna sekvantaro. Poste, kiam li okupis la Seviljan tronon, li edziĝis kun bela sklavino, Rumaykiyya, al kiu li dediĉis multenombrajn am-poemojn. Li ankaŭ multe batalis por pligrandigi sian regnon, verkis kaj hel-pis Poezion kaj altiris ĉirkaŭ si la eliton el la plej elstaraj poetoj de Okcidento. Unu el ili, kiun li tre ofte mencias en siaj poemoj estis Abu Bakr, aŭtoro inter multaj aliaj de tiu ĉi bela poemo:

LA LILIO KAJ LA ROZO.-

Kiam vekiĝas la floroj
en ektagiĝa mateno
pretas por konversacio
du belfloroj en ĝardeno.
Trinkas rozo ruĝan vinon,
lilio, laktajn esencojn...

Ambaŭ el ĉielaj mamoj
ricevis similajn benojn:
trinkis rozo dian sangon,
lilio: lakton, arĝenton,
per kiuj kreis aromojn
por ebriigi la teron.

La sklavinoj ĝoje kantas
kun akompan' de citaroj...
Miaj junuloj ne lasas,
ke la brua galopado
de malamikoj sovaĝaj
superu tiun de l' glavoj
ĉiam pli alte kantantaj
ol la huf' de la ĉevaloj.

Vere, mi ja trinkis vinon
kiu verŝis likvan helon
dum venis la nokto-nigro.

***	***	***
***	***	***

Ili fiere diskutas
pri siaj grandaj sukcesoj:
-al irisaj kolor-dioj
ruĝon mi rabis por vestoj-
-La blankon de fantazio
ŝtelis mi al kanfor-reĝo-
-Mi rivalas en ruĝeco
la grenaton, la pasiojn-
diris defia la rozo.
-Estas mia blank' l'envio
de la ekzistanta mondo-
firme respondis lilio.



*Ruĝa kiel braĝo flama
restas la roz' violenta.
Lilio pli kaj pli blankas
de rankor' kaj naŭzo plena.*

*Tiom da diskutoj vantaj
la geniojn tre ĉagrenas:
per venteg' la florojn tranĉas,
kaj ambaŭ silente svenas...*

Abu Bakr Muhammad ibn al Qutiyya.

Oni diras, ke la pripoeziaj festoj de Mutamid apud Gvadalkiviro aŭ sur la samaj akvoj de ĉi tiu rivero, kie centoj da lumigataj ŝipetoj ŝajnis fantaziajn pacajn batalojn tute neforgeseblajn: lumoj, versoj, vino, dancoj kaj ĉarmaj virinoj "pli abundaj ol steloj dum somernokto" kreis fikcian mondon mirindan kaj fabelan absolute neimageblan en nia mondo...

Venkita sur la batalo (1091) Mutamid ekziliĝis en Afriko proksime de la montaro Atlaso, kie li mizere forpasis, ĉiam rememorante liajn pala-cojn, komfortan vivon kaj la akvojn de "tiu arĝenta kampo" nomata rivero Gvadalkiviro...

Antonio Marco Botella.

30aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ. - En Palamos okazis la Festo de tiu ĉi prestiĝa beletra konkurso, kie oni proklamis la gajnintojn de la premiitaj verkoj, laŭ jena verdikto:

Premio "Natura Floro" al la verko "SENCELE" de Krystina Ungar.

Premio "Rozo" al la verko "Iam la blankajn ĉevalojn mi rajdis" de Krystina Ungar.

Premio "Eglanterio" al la verko "Patrineco" de Krystina Ungar.

Premioj "Violo" kaj "Clelia Conterno" al la verko "SENCELE" de Krystina Ungar.

Premio "J.Grau Casas", honora mencio al la verko "Tiu murmuro" de M.Marti, trad. de Hector Alós.

Premio "Domenech i Mas" al la verko "De com una vegada vaig ser fervent esperantista" de L.Beaucuire, trad. P.M. Martin.

"Boletín" gratulas la organizintojn kaj gajnintojn de la premioj.



G. Mora i Arana: poeto

Hodiaŭ venas al niaj "Lirikaj Paĝoj" tiu ĉi grava poeto en la kataluna kaj Esperanta lingvoj. Naskiĝinta en 1925, li esperantistiĝis en 1951, fininte perkorespondan kurson de Prof. Delfi Dalmau. Kursgvidanto li mem, prezidanto dum du jaroj de la Esperanta Fakto de la poliglota societo "Lingua Klubo" de Manresa, Mora i Arana baldaŭ elstaris kiel bona poeto, mi kuraĝas kvalifiki lin "poeto de interna ritmo kaj poeziaj konceptoj".

Dum jaroj apartenanta al la Redakcio de "Boletin" kaj al la Redakta stabo de "Literatura Foiro", li estis Sekretario unue, kaj nun Prezidanto de la Internaciaj Floraj Ludoj organizitaj de KEA. Gajninto de multenombraj premioj en lirikaj konkursoj, mi indikas inter aliaj: Unuajn Premiojn en la konkursoj "Comella-Bassols" kaj "Luis Hernández"(1965), Duan Premion pri Poezio en la Belarta Konkurso de UEA(1968), "Mestre en Gai Saber" de la Rat Penat de Valencio(1973), kaj ĉi-jare la majstrekan titolon "Gai Saber" (Gaja Scio) pro ricevo de la premio "Violo el Oro kaj Arĝento" en la 132a konkurso "Floraj Ludoj de la urbo Barcelono", dotita per 300.000 ptoj.

Mora i Arana estis tiel ĝentila, ke li akceptis mian proponon fari specialan version en Esperanto de la poemo verkita en la kataluna, por ke la legantoj de "Boletin" povu mem gustumi poezion de riĉa grandvalora enhavo. Jen la poemo premiita:

NEFERMITA PROCESO.-

Projekciado, introspektado.

Se kun alprojekci' el fido-kredo mi amadis
-se stratumiĝis mi laŭ sedimentoj sub malnovaj-,
al mi, ja, ĉio povas, sen prihistoriaj lecionoj,
esti eldirita,
dum, laŭokaze, mi riĉiĝas per oksidoj kaj likenoj
-kvazaŭ, meze de la ĉenita tempo kiu de ni fuĝas,
ne devus mi min mem akuzi, jen pro troa avareco
je riĉaŝo
propra el hejmaj horoj jam ĉiumomente pretaj,
por ke, orgojle, mi ne falu en kapricotentojn de l'
mornstato.

Kun revoj survestitaj per aliaj revoj,
nerealec', laŭ prismoj el plej fajna kvarco,
disigas la krepuskojn de l' forgeso
kaj nin envolvas en medion de silentokloŝo
-aŭ sub ĉiel' pentrita je aŭguroj malhaveblaj.
Dume, malnovaj aĵoj kun senŝanĝaj nomoj,
pro sentaŭgec', fariĝas pli necesaj.
Ankaŭ mi volas enkalkuli duondormo-daŭrojn
montreblajn per neniu tempomezurilo
el iluzi' kaj antaŭtagoj bone trakribritaj.
Tamen, la noktoj ĉiam estos tiaj
-kiel riveroj kontraŭfluaĵ ĝis la fonto de l'
ordonoj kaj la mitoj,
kaj prikonsiderado de l' anim-korpeco,
dum, pro bezono, devas ni rekomenciĝi.
Ĉu kredi? Ne pro l' cindro de l' paseo,
sed troviĝante ni sub la zenita vertikalo
de preteblecoj ĉiuhoraj kaj sekretaj.
Vi kaj mi, kaj l' aliaj, sed sen muroj kaj distancoj
povantaj nin sekvestri kvazaŭ estus plenvalidaj
la dialogoj de l' silento.

Se introspekte mi eniras en min mem,
celkompromiso min alpuŝas: tiu elkompreni
la proksimulojn ĉiutagajn -jam, de antaŭ multe;
tiujn de la vizaĝoj ŝanĝiĝantaj, superrealismaj,
kiujn ensonge vidas mi.
(Ĉu mi mem estas kiu provas trompi min?)

Projekciado, introspektado. Sed
kial la poezio metis antaŭ min kaptilon kiel veron
neensekretigeblan -el sintezoj mense nekapteblaj?

Tiujn, kiuj, kiel mi, admiras la poezion de Mora i Arana de antaŭ ne malpli ol 20-jaroj, tiu ĉi poemo forte impresas, ĉar ĝi ja, fine, konstatigas gravan evoluon en lia verkado de poezio. Li, certe, faris ĉiam bonan poezion, sed ĝoje mi nun rimarkas, ke li ne ankriĝis en la kutima versformo de l' pasinto kaj atentinde progresis: li saltis talente kaj aŭdace ekde la brilaj formoj kiujn li antaŭe kreis, al tiu nuna malfacile difinebla de la metafizika poezio. Liaj versoj ne plu formiĝas per vortoj, rimo kaj okulfrapaj esprimoj, sed aperas sub la formo de esploraj demandoj, de profunda introspektado, de atenta prikonsiderado de altspiritaĵoj konceptoj, kiuj iras ekde la "revoj survestitaj per aliaj revoj", apenaŭ realaj, al tiuj "sen muroj kaj distancoj povantaj nin sekvestri kvazaŭ estus plenvalidaj la dialogoj de l' silento". Kaj plias la metafizikaj esprimoj miksitaj kun poeziaj pensoj, kiam li skribas: "kaj, ĉiunokte, meze de la fluso kaj malflus' de l' dormo, jen estas kiam pli da beboj mondenvenas"... aŭ kiam aperas la dubo: "ĉu mi mem estas kiu provas trompi min?, aŭ "kial la poezio metis antaŭ min kaptilon kiel veron neensekretigeblan?" Vivo, sonĝo, duboj, en profunda introspektado, ĉio envolvita de poezio!

Sub alia aspekto, ĝuste pri versokonstruo, oni povas rimarki, ke la metriko ne plu regas liajn versojn, ĉar certa interna ritmo -privilegio nur de grandaj poetoj- kreas la adekvatan kadencan akcenton per nevidebla rimo majstranta la tutan poemon. La lirikismo de M. i A. ŝprucas nun el tiu "interna ritmo" indikita, kaj el la beleco de konceptoj, kiel ekz.: "pro kiu sintenado ankoraŭ aktualas horoj de l' velŝipoj, de l' klavicenmuziko, ktp.? "Jen ĉio ĉi, en la spaclimoj interstelaj de la hom'.

Estas tiel, laŭ mia modesta kapablo, kiel mi perceptas la poezion de Mora i Arana nun, ĉu eble influita de mia granda admiro al lia poezio? Se jes, mi sincere petas senkulpigon de niaj karaj legantoj.

A.M.B.

PRI JULIO ROMERO DE TORRES.

Sur la kovrilo de tiu ĉi numero aperas la pentraĵo "La chiquita piconera" de la kordovano Julio Romero de Torres (1880-1930). Fama pentristo pro siaj portretoj esprimantaj la topikan belecon de la hispana virino: la bildoj de tiuj virinoj, tre proksimaj al la skolo realisma, montras difinitajn nuancojn inter la realo kaj certa idealismo ekstertempa. Tiuj nekklaraj aspektoj kreis etoson favoran al grandaj diskutoj inter priartaj kompetentuloj, kiuj, siatempe, ne malheligis la sukceson de liaj ekspozicioj en diversaj hispanaj kaj eŭropaj urboj kaj la famon de la pentristo.

Ekster ĉia polemiko, la simbolaj vizioj de la virinoj de Romero de Torres, esprimantaj la andaluzan melankolion kaj certan mistikismon intiman, ankoraŭ restas senmortaj en liaj pentraĵoj...

Okaze de la 60a datreveno de la forpaso de la granda pentristo, ni elstarigas hodiaŭ tiujn artajn valorojn.

A.M.B.

ADMINISTRADO.-

Al niaj HEF-membroj:

Ni atentigas nian membraron pri la proksimiĝo de la pagoperiodo de jarkotizoj kaj rekomendas vin sendi la poŝtĝirojn al la nova kasisto de HEF S-ro José M^a Bernabeu Franco; Primo de Rivera, 6.-03360 Callosa de Segura (Alicante), aŭ prefere rekte al la konto n^o 138.150507.9. de Hispana Esperanto-Federacio en Banco Español de Crédito en Callosa de Segura (Alicante).

Same kiel pasintjare la jarkotizoj estas:

Membro-abonanto	1.700,- Ptoj.
Emerito, junulo, senlaborulo	1.200,- "
Dumviva membro	34.000,- "

Ni oportune sendos remburse la bultenon al tiuj membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis la pasintjaran kotizon.

51a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



LA LAGUNA - TENERIFE 14-19 JULIO 1991

ALIĜILO N-RO.....

(BONVOLU SKRIBI TAJPE AŬ PRESLITERE)

Familiaj nomoj
 Antaŭnomo, s-ro/ s-ino/ f-ino (1)
 Aĝo (2) Profesio (2)
 Adreso
 Urbo Poŝtkodo Provinco (3)

Mi aliĝas al la 51a Hispana Kongreso de Esperanto kaj sendas per poŝtmandato, ĉeko aŭ banko la jenan sumon:

Kiel kongreskotizon en kategorio p-tojn

Kiel kongresdonacon p-tojn

ENTUTE: p-tojn

Plenigu apartan aliĝilon por ĉiu familiano samtempe aliĝanta

- (1) Forstreku la nevalidan
- (2) Nur por statistiko
- (3) Eksterlandanoj menciuj la landon

Por uzo de la administracio:

Pago ricevita	Konfirmilo sendita	Loĝejo mendita
---------------	--------------------	----------------

KONGRESKOTIZOJ

GIS: 31-12-89 31-3-90 30-6-90

1. Kongresano	2.500	3.000	3.500
2. Kongresano (membro de HEF)	2.000	2.500	3.000
3. Kunulo/ino (f) de kongresano	1.500	1.800	2.100
4. Juna membro de HEJS (gis 30 j.)	1.000	1.300	1.500
5. Gejunuloj ne membroj de HEJS, emeritaj kongresanoj au infanaj	1.200	1.500	1.700
6. Senlaboruloj (g)	300	400	500
7. Eksterlandanoj	senpage	senpage	senpage

Membro de HEF-HEJS n-ro.....

Rimarkigoj:

- Plenigu la aliĝilon kaj sendu ĝin al la Sekretario de la OKK S-ro ANTONIO FERRER; Apartado 39.- E-38200 LA LAGUNA. Kanariaj Insuloj.
- Sendu la koncernan kotizon al la 51a Hispana Kongreso de Esperanto, konto n^o 0213300017.583.1. de CajaCanarias en LA LAGUNA. Islas Canarias.
- La kotizo ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenas en la kongreso.
- La aliĝilon oni pritraktos nur post ricevo de la koncerna pago.
- Kongresanoj en kategorio (2) kaj(4) devas sendi ateston de HEF pri la pago de la kotizo 1990 aŭ 1991.
- Kunulo: Tiu kiu loĝas samadrese kun aliĝinto.
- La senlaboruloj sendu fotokopion de atestilo.
- Loĝado kaj manĝado en similaj kondiĉoj kiel pasintjare.
- Se vi bezonas pliajn aliĝilojn, petu al la Sekretariejo de la OKK aŭ fotokopiu ĝin.

Depósito legal: Z-334-90

Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas